



tejo



REALIGPLANO 2020-2021



V●J●J AL EST●NTEC●





Enkonduko

Dum la venontaj kvin jaroj, TEJO laboros por esti pli tutmonda, inkluziva kaj malferma. Organize, aparte gravos travideblo kaj daŭripoveco en ĉi tiu strebado. La Strategia Plano orientos TEJO-n dum ĉi tiuj jaroj, prezentante defiajn celojn kaj longjarajn planojn. Sed en ĉiu jaro, ni devas precizigi la etapojn survoje al ĉi tiu horizonto. Ĝuste la Realigplano celas, ke la revoj kaj celoj de nia strategio estu konkretigitaj kaj realigitaj.

La ĉi-jara Realigplano administre diferencas de pasintaj, ĉar ĝi traktas la mandatan periodon (de septembro ĝis aŭgusto) anstataŭ la kalendaran jaron (2021). La kialoj estas evidentaj: la venonta Estraro decidos mem kiel organizi sian teamlaboron, prefere surbaze de la mandata kronologio de taskoj kaj eventoj, kiujn listigos la ĉi-mandata Realigplano.

La strukturo de tiu ĉi dokumento sekvas la nunan strukturon kaj taskodisdividon de la estrara laboro. La unua sekcio temas pri Funkciado (administrado, strukturigo, statutaj eventoj, volontuloj) kaj Financoj (negocmodeloj, subvencipetado). En la dua sekcio, ĉiu fako estas listigita laŭ alfabeto; branĉoj aŭ subrespondecoj troviĝas sub la rilata fako. Respondecaj aktivuloj kaj antaŭviditaj celoj estas resumitaj de ĉiu estrarano komence de la tabelo.

La kernaj celoj por la estrara jaro 2020-2021 konsistas el:

- Igi TEJO pli alirebla, travidebla kaj daŭripova;
- Enplekti pli da aktivuloj en la estraran, komitatan kaj asocian agadon de la Organizo per taŭga mentorado, transdonado kaj laborfluo ene de la Komisionoj;
- Kontribui al la solvado de la problemo pri membronombro;
- Okazigi gajnan IJK kun miksita reta kaj fizika ĉeesto.

Rimarkoj:

- Fleksebleco estas bezonata. Tial, la Estraro devos rajti fari ŝanĝojn laŭ sia propra kriterio, sciigante la Komitaton pri ili.
- La fakto, ke io ne aperas, ne signifas, ke nenio okazos en tiu fako. Proponu novajn erojn al la Estraro per la Komitata listo aŭ la Komitataj Laborgrupoj.
- Gvidu nin la strategia plano!

Ĉi tiu dokumento estas propono
de la Estraro de TEJO 2020-2021
inkluzive de ĉiuj oficistoj kaj CO-volontuloj
kaj kun kontribuoj de komisiitoj kaj komisionanoj



Enhavtabelo

Enkonduko	2
Enhavtabelo	3
Sekcio 1	4
Funkciado	4
Financoj	7
Sekcio 2	8
Aktivula Trejnado	8
Edukado, Scienco, Kulturo	10
Edukado	10
Scienco	10
Kulturo	11
Universitata Agado	11
Eksteraj Rilatoj	12
Kongresoj	14
Landa kaj Faka Agado	14
Informado	17
Junaj Amikoj de Esperanto	18
Patronoj	19
Projektoj	20
Talentaro	21
Talento	22
Adoleska Agado	23
Egaleco	24



Sekcio 1

Funkciado

Respondecaj aktivuloj: Konstanze (Ĝenerala Sekretario), Charlotte (Prezidanto), Roĉjo (estrarano, kunordiganto de la volontuloj), Valentin (CO-volontulo, helpanto pri CR).

Antaŭviditaj rezultoj: la funkciado de TEJO iĝos daŭripova kaj travidebla per malferma komunikado al Komitato, ambaŭvoja respondecigo de la Estraro kaj la Komitato, kaj ofta partopreno de la Komitatanoj en la Estrara laboro.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Novaj Kutimoj por Kunsidoj	dummandate	Enkonduko de ensaluto, elsaluto, kaj mansignoj dum ĉeestaj kaj retaj kunsidoj.
Mentora programo por Estraranoj	dummandate	Mentoro estas trovita por ĉiu estrarano kaj okazas interparolo almenaŭ kvar fojojn dum la mandato.
Malferma horo de Prezidanto kaj Vicprezidantoj	dummandate	Laŭeble monata malferma horo: partoprenas minimume Prezidanto aŭ unu el Vicprezidantoj; laŭeble viva elsendo.
Ĝen-Seka rondo	dummandate	Laŭeble monata lerniga rondo pri la taskoj de Ĝen-Sek: partoprenos interesitoj pri la posteno, antaŭaj kaj nunaj Ĝen-Sek de TEJO, LS, aŭ de aliaj organizoj.
Komitata kontrolo	dummandate	Regula ĝisdatigo de la informoj pri Komitatanoj, iliaj kontoj ĉe CR kaj abono en komitataj kaj komisionaj retlistoj.
Komunikado pri la estraraj kaj komisionaj kunsidoj	antaŭ ĉiu kunsido	Publika anonco pri venontaj kunsidoj en komitata listo.
Publikigado kaj arkivado de protokoloj	post ĉiu kunsido	Protokolo de estraraj kaj komisionaj kunsidoj estos sendita al Komitato; protokoloj estos alireblaj en aparta dosierujo.
Estrara Malferma Horo	dum ĉiu EsKu	Partoprenas preskaŭ ĉiu estrarano, oficisto, kaj volontulo; viva elsendo.
1a EsKu en Roterdamo	septembro	Miksita reta kaj ĉeesta partopreno de ĉiu estrarano, oficisto, volontulo, eventuale gastoj; kunsido kun UEA-oficistoj kaj Martin.
Restrukturigo de la Komisionoj, Interesgrupoj kaj Respondecoj	septembro	Plano kaj aprobo de dummandata strukturo de la Komisionoj.



Klarigbildo pri la restrukturigo	septembro	Kreado kaj sendado al Komitato de klarigbildo pri la komision- kaj respondecstrukturo de la Organizo.
Komuna estrara kalendaro	septembro	Kreado de kalendaro kun limdatoj, renkontiĝoj, eventoj, paŭzoj kaj feritagoj.
Necesaj helpantoj por volontuloj	septembro	Volontuloj konscias pri kunordiganto surloke; mentoro surloke; programkunordiganto en la estraro; estrara kontaktpersono; lingva helpanto.
Malfermo de membriĝo al CR	septembro	Malfermo al ĉiuj kiuj deziras esti listigitaj kiel komisionanoj aŭ projektanoj; malaktivigo anstataŭ forigo de la konto.
Priskribo de Komisionoj	septembro- oktobro	Por ĉiu komisiono kaj branĉo troviĝas en la retpaĝo aktuala priskribo, kontaktpersonoj, kontaktiloj, ligiloj al komunikiloj.
Verkado de Realigplano 2020/21	septembro- oktobro	Estrara malneto al komitato ĝis la mezo de oktobro; laborgrupoj dum Komitatkunsido, voĉdono ĝis la mezo aŭ fino de decembro.
Registriĝo ĉe ANBI	oktobro	Kolekti kaj sendi ĉiujn necesajn dokumentojn por ANBI-registriĝpeto.
Publikigo de la ANBI-dokumentoj en la retpaĝo	oktobro	Certigi, ke ĉiuj necesaj dokumentoj estas en la retpaĝo en la nederlanda aŭ la angla.
Planado de la 2a Komitatkunsido 2020	meze de oktobro	Planado kaj sendo al Komitato de la disvolviĝo de la 2a Komitatkunsido 2020.
Verkado de Strategia Plano	oktobro- novembro	Malneto ĝis la fino de oktobro; laborgrupoj dum Komitatkunsido, voĉdono ĝis mezo aŭ fino de decembro.
Aldono de ĉiu Komitatano al Slack	novembro	Komitatanoj aliĝas al Slack kaj aktivas en la rilataj komisionaj kanaloj.
2a Komitatkunsido 2020	novembro	Reta Komitatkunsido kun laborgrupoj pri Realigplano kaj Strategia Plano.
Verkigo de la Jarraporto 2020	ĝis decembro	Ĉiu aktivulo finverkos erojn por la Jarraporto 2020 ĝis la 2a EsKu.
2a EsKu	novembro- decembro	Miksita reta kaj ĉeesta partopreno de ĉiu estrarano, oficisto, volontulo, eventuale gastoj; kunsido kun Martin.
Propono pri nova procedo de decidfarado	decembro	Ellaboro de nova procedo pri decidfarado ene de la Estraro dum 2a EsKu.
Aprobo de Realigplano 2020/2021	decembro	Amendita, prilaborita kaj aprobita dokumento el la Komitato antaŭ la



		jarŝanĝo.
Aprobo de Strategia Plano	decembro	Amendita, prilaborita kaj aprobita dokumento el la Komitato antaŭ la jarŝanĝo.
Publikigo de Jarraporto 2020	ĝis fino de la jaro 2020	Jarraporto 2020 estos sendita al la Komitato.
Reglamenta Konsultejo	januaro	Formularo por peti klarigojn pri la reglamentoj kaj statuto. Respondoj publike al demandoj skipo de 3-4 aktivuloj.
Decido pri 3a EsKu	januaro	Decido pri loko kaj datoj de la 3a EsKu.
Mezmandata pritakso	februaro	Pritakso de atingoj ĝis tiam kaj pritakso de la celoj, kiuj restas por la mandato.
Atestiloj pri TEJO-agado	marto	Kreado de ŝablona atestilo ĉe GitHub kiu kreiĝas kaj ĝisdatiĝas aŭtomate. La atestilo celas laboremajn Komitatanojn kaj komisionanojn, volontulojn kaj oficistojn.
Lanĉo de AKSO	marto-aprilo	Ekuzado de nova sistemo por administri membrojn.
3a EsKu	marto-aprilo	Miksita reta kaj ĉeesta partopreno de ĉiu estrarano, oficisto, volontulo, eventuale gastoj; kunsido kun Martin.
Reglamenta propono pri estraraj elektoj pere de la reto	aprilo	Ŝanĝpropono al la reglamento por elektoj de Estraranoj ekster IJK.
Decido pri 4a EsKu	aprilo	Decido pri loko kaj datoj de la 4a EsKu.
Estraraj rekomendoj al la EK	majo-junio	Verkado de malpublikaj estraraj rekomendoj al la Elekta Komisiono surbaze de la tutjara komisionlaboro, Ĝen-Seka rondo, kaj disvolviĝo de la mandato. Rekomendoj pri kolektindaj dokumentoj el la kandidatoj 2021.
Planado de la 1a Komitatkunsido 2021	komence de junio	Planado kaj sendo al Komitato de la disvolviĝo de la 2a Komitatkunsido 2020.
Pritakso de la Realigplano kaj Strategia Plano	junio-julio	Pritakso de la evoluoj kaj atingoj rilate al la Realigplano kaj Strategia plano.
4a EsKu	julio	Miksita reta kaj ĉeesta partopreno de ĉiu estrarano, oficisto, volontulo, eventuale gastoj; kunsido kun Martin.
1a Komitatkunsido 2021	julio	Reta, ĉeesta aŭ miksita Komitatkunsido.



Verkigo por la Jarraporto 2021	julio-aŭgusto	Verkigo pri eroj de la Jarraporto 2021 antaŭ la fino de la mandato.
Spertigo kaj mentorado de sekvonta estraro	aŭgusto	Sekvontjare la nova Estraro havu pli bonan, ampleksan spertiĝon per trejnadaj.

Financoj

Respondecaj aktivuloj: Feliĉa (kasisto), Tomaŝ (vicprezidanto).

Antaŭviditaj rezultoj: Trovos novajn monfontojn kaj malatigos ne bezonatajn kostojn por ekvilibrigi financon.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Negocmodelo pri oficistoj	tra la mandato	Financa aŭtonomeco de la dungoj (kundungoj kun UEA/ESF aŭ tra la LS)
Negocmodelo pri volontuloj	tra la mandato	Financa memstareco de la volontula programo (poŝmono, aliĝkostoj al E-eventoj, loĝkostoj)
Esplorado pri novaj monfontoj	tra la mandato	Estas trovitaj novaj monfontoj, kiuj kongruas kun niaj agadoj, kiuj ebligas financadon + raporto al la Komitato
Pagigo de kotizoj al niaj sekcioj	tra la mandato	Landaj sekcioj komprenos kaj sukcese pagigos landajn sekciojn surbaze de la datumoj en KODEJO
Vendado de novaj t-ĉemizoj kaj aliaj esperantaĵoj	tra la mandato	Estas 100 t-ĉemizoj venditaj kaj 30-40 glasoj venditaj
Starigi financon komisionon	Novembro	Starigi financon komisionon en oktobro kun minimume 5 membroj
Prezento de Buĝeto 2021	novembro	Estas buĝeto aprobita de la Komitato.
Peti Administran Subvencion (angle: <i>operating grant</i>)	novembro-decembro	Sukcese peti la maksimuman sumon de EACEA (Education, Audiovisual and Culture Executive Agency) la Administra Subvencio (50.000 EUR)
Okazigo de membra varbkampanjo	decembro	Membroj realiĝas: pli da retenado kaj pli da novaj membroj (tutfreŝaj kaj revenintaj)
Sendo de mesaĝo al patronoj kun novjardeziroj, donaceto kaj la invito repatroniĝi	decembro	Patronoj realiĝas kaj donacas al TEJO
Sendi kandidatiĝon por la administra subvencio de KdE por 2022-2023	marto-aprilo	Sukcese peti la maksimuman administran subvencion de KdE (25.000 EUR jare)



Peti ESK-subvencion	majo (aŭ oktobro) 2021	Sukcese peti subvencion por ĝis 3 volontuloj en CO, Roterdamo
Prezento de Financa raporto 2020	junio	Aprobata financa raporto
Organizado de profitdona IJK 2021	julio	Gajna IJK (minimumo 2000 EUR)

Sekcio 2

Aktivula Trejnado

Respondecaj aktivuloj: Tomáš (respondeca estrarano), Michael Boris (komisiito)

Antaŭviditaj rezultoj:

- reaktivigo de la komisiono;
- prizorgado de daŭripoveco de la komisiono por venontaj jaroj;
- kreado de materialoj;
- okazigo de trejnadaj dum junularaj aranĝoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Trejnistaj retkunsidoj	ĉiumonate	Okazigo kaj regula partopreno de TEJO-trejnistoj (averaĝa partopreno de 6 trejnistoj kaj partopreno de 10 almenaŭ unufoje).
Kapabligo de la Estraro	septembro	Trejnadsesio je la komenco de la mandato, dum la 1a EsKu en Roterdamo.
Reta TEJO-Trejnado	decembro	Reta serio da trejnadaj por aktivuloj en Esperanto-movado, kiu estus malfermita al ĉiuj, kiuj ŝatus kapabliĝi en diversaj temoj. Partopreno de minimume 5 personoj je ĉiu trejnado
TTR (TEJO-Trejnista Renkontiĝo) 1	decembro	Reta aŭ ĉeesta renkontiĝo por la kapabliĝo de trejnistoj kun retrokoplaj sesioj cele al plikvalitiĝo de la trejnistoj; eventuale prepariga al Reta TEJO-Trejnado
Trejnada katalogo	decembro	Listo de trejnadaj kiujn la TEJO-trejnistaro povus liveri (do, listo de la trejnadaj) kun AT-Guglo-kalendaro de dumeventaj trejnadaj



Trejnado de Trejnistoj - Tuluzo: 1. trovado de trejnistoj	januaro	Komenco de organizado de la trejnado: trovado de trejnistoj, kiuj pretus gvidi kaj liveri trejnadon.
Trejnado de trejnistoj - Tuluzo: 2. kreado de temposkemo	februaro	Kreado de temposkemo de la trejnado kaj pli detalaj planoj rilate al trejnado.
Trejnado de trejnistoj - Tuluzo: 3. ĉeesto kaj partopreno	marto	Helpo kun organizado, kapabligo kaj ĝenerala subteno.
TTR (TEJO-Trejnista Renkontiĝo) 2	marto-aprilo	Reta aŭ ĉeesta renkontiĝo por kapablighomojn (plej verŝajne unutaga) kun retrokuplaj sesioj cele al plikvalitiĝo de la trejnistoj.
Okazigo de trejnadaj dum IJK 1. trovado de trejnistoj	majo	Komenco de organizado de la trejnadaj: trovado de trejnistoj, kiuj pretus gvidi kaj liveri trejnadajn, kreado de alvoko.
Okazigo de trejnadaj dum IJK 2. kreado de temposkemo	junio	Helpo kun kreado de temposkemo de la trejnadaj kaj pli detalaj planoj rilate al trejnadaj, helpo kaj ideumado kun la trejnistoj.
Okazigo de trejnadaj dum IJK 3. ĉeesto kaj partopreno	julio	Minimume 4 trejnkursoj dum la programo de IJK, ĉu en Ukrainujo ĉu rete.
Instigi al kvalifikitaj aktivuloj peti aliĝon al la TEJO-trejnistaro kaj garantii daŭripovecon de la TEJO-akademio	tra la mandato	Aliĝas novaj membroj/trejnistoj al la akademio.
Ĝisdatigo de la Aktivula Akademio	tra la mandato	Ĝisdatigo de la trejnadaj pri <u>Eksteraj Rilatoj</u> kaj por <u>novaj komitatanoj</u> kaj aktive uzata de aktivuloj: - Almenaŭ 10 finintoj en la kursoj por novaj komitatanoj kaj anstataŭantoj; - Almenaŭ 10 en KER; - Almenaŭ entute 10 en la aliaj.
Alŝuto de mankantaj retaj kursoj	tra la mandato	Aldoni kursojn pri Egaleco kaj suberoj de la temo laŭ la projekto pri Genra Egaleco.
Helpo al AMO-seminarioj	tra la mandato	Minimume 4 AMO-seminarioj kungvidataj de TEJO-trejnistoj.
Trovado de trejnistoj por JES, KS, IJF, UK, ktp	tra la mandato	TEJO-trejnado dum almenaŭ 3 junularaj eventoj partoprenataj de almenaŭ 50 personoj aŭ intergeneraciaj eventoj de almenaŭ 100 partoprenantoj.



Edukado, Scienco, Kulturo

Edukado

Respondecaj aktivuloj: Karina, estrarano.

Antaŭviditaj rezultoj: starigo de la komisiono kaj regulaj aktivajoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Lingvohelpado al landaj sekcioj de TEJO	tra la mandato	Variaj laŭkaze. Respondeculoj de landaj sekcioj raportos pri ĉiu aparta agado.
Lingvohelpado al oficistoj kaj volontuloj	septembro - junio	Aproba taksado fare de kunlaborantoj laŭ taksilo preparota tiucele; partopreno en KER-ekzameno.
Aranĝi ke TEJO kaj UEA donu atestilojn al homoj pro iliaj faroj	januaro	Starigo de klara kaj efektiva procezo por donado de atestiloj. Donado de atestiloj al ĉiuj homoj, kiuj plenumis priatestindan faron en IJK kaj VK en 2020.
Kreado de atestilo de TEJO kaj UEA por prelegantoj dum aranĝoj	januaro	Kreado de atestilo kaj starigo de klara kaj efektiva procezo por ĝia donado. Donado de atestiloj al ĉiuj homoj, kiuj prelegis dum IJK kaj VK en 2020.

Scienco

Respondecaj aktivuloj: Karina, estrarano.

Antaŭviditaj rezultoj: starigo de la komisiono kaj regulaj aktivajoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Okazigo de "temaj monatoj" laŭ la interesoj de la grupo per Zoom	tra la mandato	Homoj engaĝiĝas pri la babilado kaj aktivajoj pri la temo.
Krei videojn kun la partopreno de pluraj sciencistoj	aŭgusto-septembro	La videoj (unua , dua) aperas en la kanalo de TEJO ĉe YouTube.
Kunlaboro kun KAEST	oktobro	Partoprenigo en KAEST de junuloj kiuj prelegos.
Scienca forumo dum IJK 2021	julio-aŭgusto	Okazigo de la forumo laŭ formato nun ne fiksita, por la anoj de la grupo mem.



Kulturo

Respondecaj aktivuloj: Karina (estrarano).

Antaŭviditaj rezultoj: starigo de la komisiono kaj regulaj aktivaĵoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Kreado de Telegrama grupo pri Kulturo	oktobro	La telegrama grupo ekzistas kun almenaŭ 15 membroj kaj ĉiumonata babilado.
Konsciigo per la artikolo de Hans Becklin "Kio estas kulturo?"	fine de 2020	Kontakto aperigas la artikolon.
Filmkampanjo "Kio estas kulturo al vi?"	januaro-marto	Kompila filmeto aperas en YouTube kun almenaŭ kvin partoprenintoj.
Legorondo de TEJO okazigota per Zoom	de oktobro ĝis la fino de la mandato	Ĉiumonata legorondo okazas ekde novembro por preparoli la libron legitan la lastan monaton. Averaĝe, partoprenas 10 homoj tra la mandato.
Reta ekspozicio de artaĵoj	aprilo-majo	La ekspozicio ricevas almenaŭ 10 artaĵojn (el la fakoj pikturo kaj skulpturo). Post la afiŝado, ĝi ricevos averaĝan engaĝiĝon laŭ statistiko en sociaj retejoj. Fine, Kontakto aperigos la premiitajn artaĵojn kun komentarioj artistaj kaj juriaj.

Universitata Agado

Respondecaj aktivuloj: Karina (estrarano)

Antaŭviditaj rezultoj: pliprofundigo de la laboro de la komisiono.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Kontaktigi Esperantajn klubojn kaj esperantistojn el diversaj universitatoj	tra la mandato	Realigado de babiladoj, kvizoj kaj ludsesioj.
Okazigi esperantologian paneldiskuton inter junuloj (video + diskutado per Zoom)	oktobro-decembro	Publikigo de la video kaj okazigo de la babilado per Zoom.
Okazigi prelegon (aŭ krei videon) pri kiel starigi universitatan klubon	februaro	Publikigo de la registraĵo.
Organizi retan simpozion	februaro-aprilo	Publikigo de simpoziaj registraĵoj.



Instigi junulojn partopreni universitatan simpozion de ILEI, la Internacian Kongresan Universitaton kaj la Esperantologian Konferencon dum UK	julio	Partopreno de TEJO-anoj en tiuj eventoj.
---	-------	--

Eksteraj Rilatoj

Respondecaj aktivuloj: Charlotte, Tuŝka (estraraj kunordigantoj), Klára, Tomáš, Roĉjo (respondecaj estraranoj), Rakoen, Michael, Ana, Paulina (komisiitoj), Spyros (oficisto)

Antaŭviditaj rezultoj: Pliprofundigita kaj profesia agado alekstera kaj aktivigo de pli vasta aktivularo.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Aktive partopreni en IKRJO-taskaro	tra la mandato	TEJO estas reprezentata tutjare en la taskaro kaj reelektiĝas por 2021-2022.
Aktive okupiĝi ene de FoJE kaj pliigi la ĉeeston de TEJO	tra la mandato	TEJO estas reprezentata en ĉiuj ĝiaj laboraj strukturoj kaj eventoj kaj havas unu TEJO-kandidaton por la FoJE-estraro por 2021-2022.
Regula klerigado pri politikaj temoj en retaj eventoj	tra la mandato	Kvar retaj aktivaĵoj tra la mandato (povas esti ligitaj al la kongresoj aŭ al aliaj projektoj).
Partopreno kaj disvastigo de UNITED-kampanjoj	tra la mandato	Ĉiu kampanjo de UNITED estu disvastigita de TEJO en almenaŭ unu komunikilo, kaj ĉiu kampanjo de UNITED havu aktivan kontribuon de TEJO (ekz. grafikaĵojn, tradukojn aŭ konkurso-partoprenadon).
Sekvi malfermajn alvokojn de FoJE kaj engaĝi niajn membrojn en ili	tra la mandato	Diskonigi alvokojn kun niaj membroj kaj almenaŭ kandidatiĝi.
Aktive partopreni informadajn sesiojn de FoJE	tra la mandato	FoJE okazigas Informadajn sesiojn pri malsamaj temoj, ekz. fondusoj.
Partopreni almenaŭ en unu UPR submission kun almenaŭ unu el niaj membraj organizoj	tra la mandato	Krei dokumenton kun rekomendoj pri junularaj rajtoj kaj prezenti ĝin en Ĝenevo ĉe <i>Permanent Missions</i> .
Esti aktiva en <i>Erasmus+ Coalition</i>	tra la mandato	Partopreni la rekontiĝojn, sekvi kaj partopreni en iliaj aktivaĵoj (ekz. politikaj pozicioj).
Partopreno en UNITED-konferenco (1)	septembro-novembro	2 malsamaj junaj Esperantistoj partoprenas la konferencon (atingita) kaj kontribuas aktive programeron (neatingita).



Partopreno en la EU Junulara Dialogo (EUJD) kiel partnera organizo dum la 8a ciklo.	septembro-decembro 2021	TEJO estas partnero en la 8a ciklo, organizas konsultojn kun junaj esperantistoj kaj partoprenas la konferencojn (EUJC).
Partopreno en ĜA de FoJE	novembro	TEJO kontribuas per amendoj, aktiva partopreno, elektoj.
Partopreno en konferencoj de UNESKO NRO Forumoj	tra 2021	Konferencoj ankoraŭ ne anoncitaj kaj planitaj.
Trovado kaj konfirmo de komisiitoj pri la Konsilio de Eŭropo, UNOY, kaj IKRYO	januaro-februaro	Komisiitoj ekoficas kaj ekagadas.
Partopreno en UNITED-konferenco (2)	februaro-aprilo	2 malsamaj junaj Esperantistoj partoprenas la konferencojn kaj kontribuas aktive programeron.
Trovado de partoprenontoj al COMEM, spertigo kaj transdono	februaro-aprilo	Du partoprenontoj al COMEM en aprilo estas trovitaj kaj preparitaj aktive ĉeesti.
Strategio kaj kampanjo por la Konsila Konsilio de la Konsilio de Eŭropo (<i>Advisory Council on Youth</i>)	februaro-aprilo	Kandidato estas trovita antaŭ COMEM kaj sukcese elektigatas.
Partopreno en UN EKOSOK Junulara Forumo	aprilo	TEJO sendas delegacion al la forumo.
Partopreno en COMEM	aprilo	TEJO kontribuas per amendoj, aktiva partopreno, elektoj al AC.
Partopreno en YO!Fest 2021	majo	TEJO sukcese kandidatiĝas kaj estas akceptita kiel partnera organizo kaj sendas delegacion de 20-25 junuloj.
Kontribuo de UNITED-aktivulo al Esperanto-evento	majo-aŭgusto	UNITED-aktivulo partoprenas kaj aktive kontribuas al iu grava Esperanta aranĝo.
UN Alt-Nivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo (<i>High-Level Political Forum, HLPF</i>)	julio	TEJO sendas delegitaron.
Partopreni en Ĝenerala Asembleo aŭ/kaj Pacforumo de UNOY	aŭgusto 2021	UNOY deziris iomete ŝanĝi siajn eventojn kaj krei novajn kunsidojn, sed pro la pandemio neniu evento okazis en 2020. Malfacilas antaŭvidi kio okazos en 2021.
Partopreno en UN Ĝenerala Asembleo	septembro 2021	TEJO sendas spertigitan delegitaron.



Kongresoj

Respondecaj aktivuloj: Carlos (vicprezidanto)

Antaŭviditaj rezultoj: starigo de la komisiono por 7 daŭripovaj kongresoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Helpo al organizado de eventoj	tra la mandato	Ni kunlaboras, helpas kaj konsilas la organizteamon de almenaŭ 5 landaj, fakaj aŭ internaciaj Esperantaj eventoj.
Teamo por organizado de retaj eventoj	septembro	Ni starigas aktivulan grupon en Telegramo de almenaŭ 5 membroj.
Antaŭelekto de 78a IJK	decembro	TEJO pretigas kaj finas la 1an alvokon por okazigi IJK.
Organizado de konkurso "Partopreni IJKn"	januaro-marto	Okazigo kaj elekto de gajnintoj de la konkurso.
Elekto de 78a IJK	januaro	TEJO elektas lokon kaj teamon por okazigi la 78an IJK.
Organizado de reta(j) evento(j)	aprilo	TEJO okazigos almenaŭ 1 semajnfinan retan eventon. La unua okazos dum la unua semajnfino de aprilo.
77a IJK	aŭgusto	Okazas IJK.

Landa kaj Faka Agado

Respondecaj aktivuloj: Albert (estrarano)

Antaŭviditaj rezultoj: Aktivigo kaj renovigo de la komisiono. Aktiva komunikado kun landaj kaj fakaj sekcioj kaj starigo de regula kunlaboro inter TEJO kaj landaj/fakaj sekcioj..

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Krei reton de aktivuloj kaj sekcioj ĉirkaŭ la mondo	tra la mandato	La listo de nomoj estas en la retejo de TEJO.
Kunsidi kun la estraro de ĉiu landa kaj faka sekcio	tra la mandato	La kunsidoj okazos regule.
Plani kaj okazigi interkonektadan kaj kapablokonstruadan eventon por membraj organizoj	tra la mandato	Organizi interkonektada(j)n reta(j)n evento(j)n por estraroj kaj aktivuloj de membraj organizoj kun ebla programo. (eblo inkluzivi trejnadon,



		teamkonstruadon, ktp).
Elekti novajn ĉefkomisiiton kaj vickomisiitojn por ĉiu kontinento kaj por fakaj sekcioj	januaro	La Komisiono havas novajn komisionanojn kiuj konas siajn respondecojn.
Prepari KODEJO 2020	ĝis januaro	KODEJO 2020 estas preparita.
Sendi la demandojn por KODEJO 2020	januaro	KODEJO 2020 estas dissendita.
Krei raporton de KODEJO 2020	marto	KODEJO 2020 estas dissendita kiel raporto.
Analizi la aktivecon de ĉiu landa kaj faka sekcio	aprilo	La analizo okazas. Ĉi tio povus esti kadre de KODEJO aŭ surbaze de ĝi en alia raporto.
Kontakti ĉiujn komitatanojn persone	januaro?	Ĉiu nuna komitatano havis parolon kun estrarano aŭ vickomisiito de LFA, informoj notitaj.
Donackampanjo por malriĉaj sekcioj	marto?	Organizi sukcesan donackampanjon por subteni LS, por povi pagi sidejon aŭ aliajn administrajn kostojn.
Mentoroj por novaj sekcioj	tra la mandato	Kiam nova sekcio estas starigita, ĝi ricevu mentoron por subteni ĝin.
Okazigi regulajn kunsidojn de la Komisiono	tra la mandato	La Komisiono ĉiumonate interŝanĝas raportojn pri la progreso de siaj taskoj kaj difinas tuj venontajn planojn.
Starigi formularon, kiun devas respondi landaj kaj fakaj asocioj por informi la Komisionon pri iliaj aktualaj estraroj kaj doni aliajn bazajn faktojn	tra la mandato	El la detaloj akiritaj eblas kompili ĝisdatan adresaron de estraranoj de lokaj kaj fakaj sekcioj kaj realigi la planon "Sekcio de la Semajno." Tiujn informojn eventuale eblos aperigi en la retejo de TEJO.
Organizi konsultajn kunvenojn kaj forumojn por ebligi komunan raportadon pri propraj agadoj kaj reciprokan konsiladon	tra la mandato	Sekcioj havos ŝancon lerni de aliaj pri ties problemoj kaj agadoj kaj atingoj kaj proponi solvojn el ekzistantaj praktikoj aŭ pasintaj spertoj.
Kunlabori kun kontinentaj kaj fakaj komisionoj de UEA	tra la mandato	La Komisiono akiras informojn de nejunularaj asocioj en landoj, en kiuj ne ekzistas junularaj organizoj aŭ la junularaj organizoj ne estas aktivaj aŭ facile kontakteblaj.



Sendi adresaron kaj sinprezenton de la nova Komisiono al landaj kaj fakaj sekcioj	januaro	La Komisiono anoncas sian reviviĝon kaj prezentas sin je dispono de landaj kaj fakaj sekcioj.
Okazigi rondan tablon: "Kion TEJO povas fari al landaj kaj fakaj sekcioj?"	januaro	Ni havas pli klaran bildon pri tio, kion vere povas fari TEJO por siaj landaj kaj fakaj sekcioj.
Kolekti doseriojn, kiuj estis por la Komisiono verkitaj en la pasinteco, por eventuala reuzo aŭ plibonigo	januaro-februaro	La Komisiono retrovas kaj aliras dokumentojn kiujn ĝi povas reviziti aŭ konsideri por estonta agado.
Inviti aktivulojn de landaj kaj fakaj sekcioj por ĉeesti kunsidojn de komisionoj kaj interesgrupoj kaj iĝi anoj de ties grupoj	januaro-februaro	Aktivuloj de sekcioj regule kontaktas kun alilandaj kolegoj de la samaj fakoj kaj regule partoprenas en la agado de ĉiu komisiono.
Pretigi Indonezian Esperantistan Junularan Organizon (IEJO) por iĝi landa sekcio	februaro	IEJO jam aktive preparas por aliĝi al TEJO antaŭ la jarfino. La Komisiono donas kroman atenton al ilia aliĝo.
Partoprenigi ĉiun landan kaj fakan sekcion en la reta evento de TEJO	aprilo	Ĉiu landa kaj faka sekcio havas almenaŭ 1 partoprenanton en la reta evento.
Pritaksi la entutan agadon de la Komisiono en la lastaj kvar monatoj	aprilo	La Komisiono amplekse esploras, ĉu ĝi sukcesis en siaj unuaj kelkaj monatoj de agado.
Verki dokumenton, kiu enhavas gvidajn demandojn kaj indikilojn kiuj helpas al organizoj difini sian progreson en diversaj agadkampoj (aparta al KODEJO)	majo	Sekcioj povas taksi kiel bone ilia agado evoluas rilate al iu difinita agadkampo kaj kio mankas en ilia organizo.
Asigni mentorojn al landaj kaj fakaj sekcioj pri specifaj agadkampoj	majo-junio	Sekcio ricevas konsilojn de aktivuloj pri specifaj laborkampoj, pri kiuj ili spertas malfacilaĵojn (laŭ la rezultoj de KODEJO). Utiligos la mentoran programon de la Komisiono pri Talento.
Krei gvidliniojn pri kunlabora programo inter landaj kaj fakaj sekcioj	junio-julio	Eblos "ĝemeligi" landajn kaj fakajn sekciojn por realigi komune organizitajn projektojn aŭ eventojn.
Kompili ampleksan raporton de la Komisiono por aldoni al la Jarraporto	junio	La sekcio pri Landa kaj Faka Agado denove havos enhavon en la Jarraporto de TEJO.
Okazigi movadan programeron dum la IJK (aŭ ian foiron de junularaj	julio	TEJO donas ŝancon al aktivuloj, kiuj ŝatus partopreni movadajn programerojn



organizoj)		kaj konatiĝi kun aliaj sekcioj.
Okazigi finan pritakson pri la agado kaj atingoj de la Komisiono	aŭgusto	La Komisiono taksos, ĉu ĝi estos sukcesa rilate al multaj siaj agadoj tra la mandato.
Pretigi dokumentojn kaj informojn por transdono al la sekva respondeca estrarano	aŭgusto	Ĉiuj informoj kolektitaj, dosieroj kreitaj, kaj atingoj efektivigitaj de la Komisiono estos facile kompreneblaj de la nova Estraro.

Informado

Respondecaj aktivuloj: Roĉjo (estrarano); Ariel (oficisto).

Antaŭviditaj rezultoj: nova retpaĝo, daŭra kreado kaj dissendado de profesia enhavo, pli bona eluzo de haveblaj kapabloj por subteni Esperanto-movadon

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Sinprezento de estraro	oktobro	Filmeto estas publikigita.
Purigi retpaĝaron	oktobro	Forigi neĝisdatajn kaj nefunkciajn retpaĝojn.
Gastigi alvokojn de esperantistoj	fino de oktobro	TEJO havas formulareton kaj kontaktadreson por aperi alvokon/sinprezenton. Ĉi tio inkluzivas malfermitan formularon por peti varbadon en TEJO-medioj por specifaj agadoj.
Subtekstigteamo kaj tradukteamoj	novembro	TEJO havas klare dokumentitajn procedojn por subtekstigi kaj traduki enhavon kaj ankaŭ kontakteblajn volontularojn.
Komuna kalendaro de TEJO	ekde decembro	Malferma kalendaro kun okazaĵoj de sekcioj, komisionoj, ktp. Realigebla per Eventa Servo.
Ciferecigi Kontakton kaj TEJO Tutmonde	novembro	TEJO scias kion skani, kiel ciferecigi, kaj kiel eluzi.
Nova retpaĝo de TEJO	decembro	Ekzistas plano pri kvanto de laboro kaj tempoplano kaj kontrakto por realigo.
Sekcio de la semajno	ekde januaro	Ĉiusemajne atento en internaj sociaj komunikiloj pri iu landa aŭ faka sekcio.
Varbkampanjo pri IJK	januaro	Estas bela retpaĝo, grafikaĵoj, eble filmeto, kaj afiŝoj en sociaj komunikiloj.



Varbkampanjo pri Junaj Amikoj	februaro	Bone videbla kampanjo en sociaj komunikiloj de TEJO, per propra retpaĝo, raportadi pri rezultaj nombroj.
Ciferecigi Kontakton kaj TEJO Tutmonde	marto	Ĉiuj eldonoj estas ciferecaj aŭ skanitaj. Por arĥivado kaj ebla publikigo.
Ĝisdatigo de TEJO sinprezentas	marto	Ni kreas tutenhavan ĝisdatigitan lumbildaron por pluraj publikoj.
Varbkampanjo pri reta evento	marto	Kelksemajna varbkampanjo en komunikiloj de TEJO.
Traduko de TEJO sinprezentas	aprilo	Almenaŭ tradukita estas ĝi en la anglan, francan, germanan, ĉinan, hispanan kaj portugalan.
Varbkampanjo pri IJK	aprilo	IJK 2021 havas informplenan retpaĝon, grafikajojn, eble filmeton, kaj afiŝojn en sociaj komunikiloj.
Kampanjo pri estrarkandidatoj	junio	Estas retpaĝa afiŝo, grafikajo, filmetoj por varbi.
Antaŭplanitaj rektaj elsendoj de IJK	dum IJK	Elsendoj okazas je la anoncigitaj horoj.
Nova retpaĝo de TEJO	ĝis fino de la mandato	Funkcia retpaĝo kun sama enhavo kiel nun, kaj integriĝo kun datumbazo.
Serio Enmovade	ĉiumonate	Ĉiumonate aperos filmeto.
Serio Verdire	post iu renkontiĝo	La filmetoj estas realigitaj.

Junaj Amikoj de Esperanto

Respondecaj aktivuloj: Carlos (estrarano), Roĉjo (estrarano)

Antaŭviditaj rezultoj: plistrukturigo de Junaj Amikoj, ekoferti ĝin kiel unuan ŝtupon de membriĝo

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Funkciigo de formularo	oktobro	Uzebla, tradukita kaj atingebla membriĝformularo.
Kolekto de ĝisnunaj aliĝoj	novembro	Ĉiuj onidiraj iamaj membrolistoj estas trovitaj.
Starigo de la kategorio	novembro	Funkciigi ĝin kiel kategorion same uzeblan kiel ĉiuj ĝisnunaj membrokategorioj.



Registrado de ĝisnunaj aliĝoj	decembro	Ĉiuj trovitaj membroj aperas en AKSO.
Disvastigo de la kategorio	ĝis fino de la mandato	TEJO aligas almenaŭ 100 novajn membrojn al la kategorio.
Aktivado de la kategorio	ĝis fino de la mandato	TEJO sendas ĉiun duan monaton almenaŭ 1 mesaĝon al la membroj de la kategorio.
<i>Elektado de komitatano C</i>	<i>majo</i>	<i>Komenco de la voĉdonprocedo</i>

Patronoj

Respondecaj aktivuloj: Klára (estrarano); Ariel (oficisto).

Antaŭviditaj rezultoj: Plifortigo de la kontakto kun ekzistantaj patronoj, tiel ke ili ricevas de ni atenton kaj kontakton, estas informitaj pri niaj agadoj kaj restas patronoj. Plimultigo de la individuaj kaj organizaj patronoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Listigo de servoj por patronoj	oktobro	Aperas klara listo de ĉiuj servoj por patronoj.
Informado al patronoj pri nia agado cele al daŭra patrona subteno (1)	oktobro	Retmesaĝo estas sendita al ĉiuj patronoj kun informoj pri lastatempaj agadoj kaj atingoj de TEJO kaj danko por la subteno. En oktobro, mesaĝo enhavas informojn pri anoj kaj planoj de la nova Estraro. - Iloj: kontaktabloj de ĉiuj, jarraporto, cirkuleroj, helpo de volontuloj. okazis novembre
Informado al patronoj pri nia agado cele al daŭra patrona subteno (2)	decembro	Retmesaĝo aŭ evt. poŝtkarto estas sendita al ĉiuj patronoj la 15-an de decembro (Zamenhofa Tago) kun la invito repatroniĝi.
Kampanjo por individua patroniĝo	decembro	Individuoj ricevas tra pluraj kanaloj (Esperanto-revuo, Kontakto, retejo, sociretaj kanaloj) kuraĝigon patroniĝi kun klaraj informoj pri prezoj kaj avantaĝoj. La kampanjo ankaŭ montras la spertojn de nunaj patronoj.
Malferma horo de TEJO por Patronoj	januaro-marto	Okazas aparta malferma horo por patronoj je taŭga horo, en semajnfino, kun taŭga kunordigo kun UEA, en kiu partoprenos almenaŭ la duono de la patronoj. - Rimedoj: reta kunvenilo, retroŝta



		invitilo al patronoj (kun ligilo al kunveno) kaj informo tra ĉefaj kanaloj de TEJO (kun retadreso kie peti aliron).
Membriĝkampanjo por patronaj asocioj	februaro	Bone videbla kampanjo en sociaj komunikiloj por asocia patroniĝo.
Informado al patronoj pri nia agado cele al daŭra patrona subteno (3)	aprilo	Retmesaĝo estas sendita al ĉiuj patronoj aprile, kun retrokupro pri kiel status planoj menciitaj en antaŭaj informiloj.
Informado al patronoj pri nia agado cele al daŭra patrona subteno (4)	julio	Retmesaĝo estas sendita al ĉiuj patronoj julie, kun mandatfina saluto.
Interago kun patronoj	dum UK	Alparoli, videbligi, danki, montri al ili rezultojn de nia agado
Peti ankaŭ pli ol kutima kotizo	mankas dato	Sugesti al patronoj, ke ili pagu la kotizon aŭ pli

Projektoj

Respondecaj aktivuloj: Carlos (estrarano), Tomáš (estrarano), Paulína (oficisto), Spyros (oficisto), Žeňa (komisiito)

Antaŭviditaj rezultoj:

- Almenaŭ 1, ideale 2 sukcesaj kandidatiĝoj por Erasmus+ inkluzive de interkontinenta projekto;
- Sukcesa kandidatiĝo por studsesio de KdE;
- Sukcesa kandidatiĝo por laborplano de KdE;
- Sukcesa kandidatiĝo por ESK.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Regulaj kunsidoj pri projektoj	tra la mandato	Okazas grupa elpensado pri la temoj de projektoj, partneroj, taskodisdivido, ĉefe antaŭ la limdatoj.
Efektivigo de studsesio 'X-lingvo' en Budapeŝto, Hungario (KdE projekto)	septembro 2020 kaj 2021	Okazas interrete en septembro 2020 kaj fizike en septembro 2021.
Efektivigo de HRE NTC en Slovenio (KdE projekto)	oktobro	Okazas la projekto per fizika aŭ interreta formato en oktobro.
Kandidatiĝo por la oktobra limdato de Erasmus+	oktobro	TEJO sendas projektan kandidatiĝon.
Engaĝo de landaj sekcioj en projektoj	oktobro ĝis januaro	Ni eltrovas kiujn landajn sekciojn ŝatus partopreni en projektoj kaj pri kiuj temoj kaj engaĝas ilin en la tuta procedo, ekscias el ili pri eventoj taŭgaj por okazigi projekterojn.



Subvencipetado por interkontinenta projekto tra Erasmus+	decembro ĝis februaro	TEJO preparas KA2-kapablokonstruadan projekton kun Sudamerikaj organizoj kiel partneroj. Ekzistas teamo, mandatiloj, ideoj, buĝeto, eventoj. Limdato: februaro.
Partneriĝo en Eŭropa-Azia projekto	februaro	Interkontinenta Erasmus+ projekto. TEJO instigu la kreadon de kapablokonstruadan (KA2) projekton, serĉu kunordiganton kaj estu partnero en ĝi.
Efektivigo de la projekto "Edukante Junulojn pri Intersekcio Aliro" kun SKEJ (KdE projekto)	marto	La projekto okazas fizike en marto.
Efektivigo de la studsesio pri 'Klimata Generacio' (KdE projekto)	marto	La studsesio okazas en marto.
Kandidatiĝo al KdE por studsesio en Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo aŭ Budapeŝto por 2021/2022	aprilo	TEJO havas unu sukcesan kandidatiĝon por la dua semestro de 2020 aŭ unua semestro de 2021.
Kandidatiĝo al KdE por jara laborplano por 2021 aŭ 2022	aprilo	TEJO sukcesas en almenaŭ unu kandidatiĝo por 2021 aŭ 2022.
Kandidatiĝo por la aprila limdato de Erasmus+	aprilo	TEJO rekandidatiĝas, alikadre kaze de sukceso en oktobro.
Sukcesa kandidatiĝo por ESK	aprilo (aŭ oktobro) 2021	Temas pri fonduso por volontuloj. Oni ankoraŭ ne diskonigis konkretan subvencilimdaton.

Talentaro

Ĝenerale

Respondecaj aktivuloj: Klára, Karina (respondecaj estraranoj), komisiitoj de ĉiuj branĉoj (Euleax, Soraya, David, Cyprien, Nickson, Brijako), poste transprenu tion la ekzistantaj reprezentantoj

Antaŭviditaj rezultoj: Vidu la ununuran celon

Plifortigo de la kunlaboro inter la tri branĉoj	januaro	<ul style="list-style-type: none"> - Ĉiu branĉo havu, krom komisiiton, reprezentanton kiu kunordigas kaj komunikas kun la aliaj branĉoj - Reprezentantoj anu en komunikkanaloj de la aliaj branĉoj - Reprezentantoj anu en aparta kunordiga grupo inter si - Reprezentantoj regule trasendu informojn kaj helpopetojn ambaŭdirekte
---	---------	--



	inter sia branĉo kaj la aliaj
--	-------------------------------

Talento

Respondecaj aktivuloj: Klára (respondeca estrarano), Nickson, Charlotte B. (komisiitoj)

Antaŭviditaj rezultoj: La komisiono denove estos aktiva kaj taŭge plenumos sian taskon, helpante novajn aktivulojn trovi taŭgan rolon kaj subtenon, kaj helpante la organizon plenigi vakajn postenojn. Jen [detaliga realigplano por Talento](#).

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Efika plusendado de novaj aktivuloj al taŭgaj trejnadoj (kunlaboro kun AT)	novembro	Ĉiu nova aktivulo kiu alprenas rolon, rapide estas plusendita al taŭga trejnado por tiu rolo en Aktivula Akademio kaj eventuale invitata al ĉeesta(j) trejnado(j),
Aktivigi la komisionon	decembro	<ul style="list-style-type: none"> - Estas aktiva komisiito en ĉiu kontinento. - Estas aldonaj komisionanoj, kiuj regule agadas en la komisiono. - La baza laboro de Talento okazas (trovi, helpi kaj plusendi novajn aktivulojn, trovi kaj plenigi vakajn postenojn)
Informa kaj aktiva retmesaĝ-ĉeno por novaj membroj (kunlaboro kun M&I)	decembro	Ĉiu nova membro de TEJO ricevas ĉenon de retmesaĝoj kun utilaj informoj kaj aktivebloj en TEJO/Esperantujo, inkluzive de klaraj invitoj aktivi en komisionoj.
Kreado de Mentora Programo	januaro	Ricevas mentoron: <ul style="list-style-type: none"> - aktivuloj kiuj volas starigi landan sektion (kunlabore kun LA) - novaj komisiitoj,
Pritakso de la celo "Efika plusendado de novaj aktivuloj al taŭgaj trejnadoj"	januaro	La koncernatoj kunvenas por pritaksi, ĉu la celo estis atingita. Se ne, kiel adapti ĝin? Se jes, kio estu la sekvaj paŝoj?
Pritakso de la celo "Aktivigi la komisionon"	februaro	La koncernatoj kunvenas por pritaksi, ĉu la celo estis atingita. Se ne, kiel adapti ĝin? Se jes, kio estu la sekvaj paŝoj?
Pritakso de la celo "Informa kaj aktiva retmesaĝ-ĉeno por novaj membroj"	februaro	La koncernatoj kunvenas por pritaksi, ĉu la celo estis atingita. Se ne, kiel adapti ĝin? Se jes, kio estu la sekvaj paŝoj?
Pritakso de la celo "Kreado de Mentora Programo"	marto	La koncernatoj kunvenas por pritaksi, ĉu la celo estis atingita. Se ne, kiel adapti ĝin?



		Se jes, kio estu la sekvaj paŝoj?
Ekigi sekvan planon por Mentora Programo	aprilo	La koncernatoj kunvenas por ellabori la sekvan planon ĝis la mandatfino por Mentora Programo. Surbaze de ĝisnunaj spertoj kaj enketo en la diversaj komisionoj, oni decidas pri 2 aldonaj roloj kiuj bezonas ankaŭ mentoron kaj pri plano efektivigi tion.
Efektivigi mandatfinan planon de Mentora Programo	aŭgusto	La celoj pri Mentora Programo, deciditaj en aprilo, estas atingitaj.
Pretigi dokumentadon por la sekva respondeca estrarano	aŭgusto	Ĉiuj atingoj kaj novaj kutimoj rilate al Talento estu dokumentitaj en la Talento-guglujo.

Adoleska Agado

Respondecaj aktivuloj: Karina (estrarano)

Antaŭviditaj rezultoj: starigo de la komisiono.

Planita agado dum la mandato 2020-2021		Sukcesindikiloj kaj komentoj
Okazigo de prezentoj pri profesioj por montri al la adoleskantoj kiel estas la fakoj en universitatoj en malsamaj landoj (la prezentoj okazos per Zoom)	tra la mandato	Adoleskantoj interesiĝas pri la prezentoj kaj aktive elektas la temojn de la venontaj.
Aktivigi la grupon per Telegramo kaj videaj kunsidoj inter la membroj per Zoom	tra la mandato	Estu aro de adoleskantoj kiuj kunlaboras inter si kaj konatiĝas unuj kun la aliaj danke al la grupo de TEJO.
Diskonigi demandaron pri la situacio de adoleskantoj en Esperantujo	oktobro	Ni kolektas respondojn de adoleskantoj kaj analizas kiel, surbaze de tio, komencian agadon.

Egaleco

Respondecaj aktivuloj: Klára (respondeca estrarano), Euleax (komisiito)

Antaŭviditaj rezultoj: La egaleca agado de TEJO plivastiĝas al novaj agadkampoj kaj pli ambiciaj projektoj.

Planita agado dum la mandato 2020-2021	Sukcesindikiloj kaj komentoj



Kreado de ĝenerala grupo Egaleco kun pluraj subgrupoj	februaro	<ul style="list-style-type: none"> - Estas ĝenerala Egaleco-komisiito en regula kontakto kun la respondeca estrarano. - Estas ĝenerala Telegramgrupo por kunordigaj diskutoj kaj kunsidoj, kun almenaŭ unu aktiva ano krom la komisiito kaj estrarano.
Kreado de subgrupoj por Egaleco	februaro	<ul style="list-style-type: none"> - Estas almenaŭ 3 subgrupoj pri Egaleco. - La subgrupo pri Genra Egaleco havas komisiiton kaj almenaŭ 3 anojn. - La subgrupo pri Genra Egaleco havas daŭre aktivan Telegramgrupon, daŭrigas antaŭajn projektojn kaj komencas almenaŭ unu novan projekton. - La subgrupo pri Alireblo havas komisiiton kaj almenaŭ 3 anojn, aktivan Telegramgrupon kaj komencas almenaŭ unu projekton. - La subgrupo pri Tutmonda Egaleco havas komisiiton kaj almenaŭ 3 anojn, aktivan Telegramgrupon kaj komencas almenaŭ unu projekton. - La subgrupo Liberen havas komisiiton kaj ekigas almenaŭ unu projekton.
Pritakso de la celoj "Kreado de ĝenerala grupo Egaleco" kaj "Kreado de subgrupoj"	aprilo	La koncernatoj kunvenas por pritaksi, ĉu la celo estis atingita. Se ne, kiel adapti ĝin? Se jes, kio estas la sekvaj paŝoj? Estas nova plano kun novaj celoj ĝis aŭgusto.
Kreado de novaj egalec-rilataj kapabligaj eventoj (kunlaboro kun AT)	aŭgusto	<ul style="list-style-type: none"> - Genra Egaleco, Tutmonda Egaleco kaj Alireblo kreas po unu novan trejnadon, ĉeestan aŭ retan. - Almenaŭ unu el la novaj trejnadoj ĉi-jare okazas, t.e. aktivuloj partoprenas ĝin ĉeeste aŭ pruveble sekvis la retan trejnadon.
Efektivigi mandatfinan planon	aŭgusto	La celoj deciditaj en aprilo estas atingitaj.
Pretigi dokumentadon kaj transdonon por la sekva respondeca estrarano	aŭgusto	Ĉiuj atingoj kaj novaj kutimoj rilate al Egaleco estas dokumentitaj en la Egaleco-guglujo. Okazas transdono de kurantaj projektoj, inkluzive de rememorigo pritaksi la celon de kapabligaj eventoj.